A continuación presentamos el índice de contenido del libro, para que se pueda apreciar el "buen sabor de boca" que ofrece esta obra:

Prólogo hacia la utopía
Cuento para adultos
Coliflores y esperanto
Todo empezó cuando vivíamos en cavernas
Aclarando conceptos
Tras la necesidad de una lengua internacional aparece el Volapük en Alemania
Brevemente: ¿esperanto?
"¿Por qué usar una lengua puente?"
"Usar una lengua auxiliar es una tontería, ¡yo soy un ciudadano del mundo!"
"¡Pero si el esperanto no acabará con la maldad en el mundo!"
"Sois unos frikis"
Hablemos de la cultura esperantista
"¿Qué significa Esperanto?"
Un ejemplo práctico...
"¿El esperanto es una lengua sin alma?"
¿Cuánta gente habla esperanto?
"¿En qué lugares se habla más?"
"¿Pero eso no es algo que ya ha desaparecido?"
"¿Cuánto tiempo tardará tu hijo en aprender esperanto?"
¿No es muy artificial? Seguro que no es bueno...
"Lo veo una tontería, ya tenemos el inglés."
El esperanto ayuda a dominar mejor tu lengua propia
El valor propedéutico del esperanto
"¿Por qué no lo usan los gobiernos de manera oficial?"
La comunicación humana en un plano de igualdad
Despilfarro millonario de dinero
Información, información y más información...
"El esperanto, ¿tiene derechos de autor?"
Reconocimiento oficial
Miedo al esperanto
Las persecuciones contra el esperanto
Mitos
Vivimos el reflejo de lo absurdo
"El esperanto, ¿por qué no ha triunfado?"
"El esperanto es una lengua muerta, ¿para qué la debería aprender mi hijo?"
"¿Pero tiene futuro el esperanto?"
"¿Sois una secta?"
La difusión del inglés o la ecología de las lenguas
La industria norteamericana y lo que ella promueve
"¿Cómo puedo escribir las letras del esperanto?"
"¡El inglés es más importante que el persa!"
Menos es más. El esperanto os enriquecerá
"¿Se puede decir y expresar todo en esperanto?"
En el mundo hacen falta más utopías y sobran gilipollas.
"¿Dónde puedo aprender esperanto?"
El manifiesto de Praga
Experimento: Cinco minutos cada día
Resumen y conclusión
Bibliografía y apuntes
Atrévete a practicar

Fuente: http://colifloresyesperanto.es/

Disvastigado de Esperanto

Plej necese estas koni la ĝustan tempon agi



Estante komercisto, pri reklamado mi ja scias, sed pri reklamado de Esperanto mi bezonis investi tempon kaj monon. Mia unua sperto estis en 2002 en Danio kaj sekvis Belgio, Francio, Germanio, Italio, ktp; entute 13 landoj. Ĉiam, ion novan mi lernis survoje: pli altiras konkretaĵoj, necesas laboro de grafikisto kaj reklamisto, taŭgas mallongaj tekstoj, ktp.

Mia celo estas veki la amaskomunikilojn, ĉar sen ili ni ne povas esperi pri la fina venko. Konsekvenco de tio estos la konkero de la popolo, kiu siaflanke influos la politikistojn.

Post 9-foja reklamado en *Le Monde,* en junio 2010 mi negocis la aperigon de novaĵo pri lingva malegaleco. Tamen ilia reprezentanto, s-ro Meixner, diris, ke intereso ne estis. Mi, do, planis prelegvojaĝon al 9 francaj urboj por varbi reagantojn al la Z-taga tutpaĝa anonco.



Post prelego en Parizo mi veturis al Vannes, kie mi subite malsanis. Mi telefonis al mia edzino: “Mi revenos, ĉar mi ne povas spiri”. Ŝi respondis: Esperanto-Movado estas pli grava ol via vivo, do daŭrigu. Sed mi ne povis teni min kaj kiam mi alvenis Osakon, ne povis moviĝi.

La publiko serioze kaj sincere aŭskultis. Post apero de la reklamo, mi ricevis centon da leterkopioj al Le Monde; verŝajne ĝi ricevis pluroble pli ol mi. Al la publika intereso, ilia respondo estis ignorado. Mi sentis, ke mi staras antaŭ giganta kaj fortika muro pro desupra premordo kaj ke ili estis monavidaj... sed ‘dissaltos la obstinaj baroj per la sankta amo disbatitaj’.

Kio estas la rezultoj de la agado en ĉi tiu jardeko? Inter la negativaĵoj menciendas, ke en la komenco la reklamado ne sufiĉe profesiis: ne persvada enhavo, tro da tekstoj, ne konkretaj informoj, ne taŭga aspektigo. Plie, mi nur 1-foje reklamis en 1 lando… ja ripetado estas esenca.

Kiam aperis la anonco en *Rzeczpospolita* en 2004, okazis lunĉodebato en Varsovio kun la litovaj kaj polaj EU-parlamentanoj. Tiam Bronisław Geremek, EU-vicprezidanto kaj eksa ministro pri eksterlandaj aferoj en Pollando, rifuzis ĉeesti kaj private renkonti min, ĉar li konvinkiĝis, ke Esperanto ne povus venki. Tamen en majo 2008 mi sukcesis tuŝi lian koron per anonco en ‘Le Monde’. Tiam EU rifuzis utiligi la polan en sia retejo kaj post kunveno kun Seán Ó Riain kaj Jozef Reinvart li kunorganizis la debaton ‘Esperanto, ĉu amiko aŭ malamiko de multlingvismo?’ por ĉiuj parlamentanoj la 14-an de julio. Tragike li mortis aŭtakcidente survoje al Bruselo. Li estis konvinkita, ke plejparto el la EU-parlamentanoj kontraŭas la anglan dominadon kaj ke estas granda manko de scioj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto. De liaj observoj ni profitu!

La anoncoj vekis homojn kiel Isabel Castro, direktoro de Eurimages aŭ la urbestron de St-Aignan de Grand Lieu, kiuj montris intereson pri la lingvo kaj la Movado. Post aperigo en *La Repubblica* en 2003,

8 italaj parlamentanoj promesis al Itala E-Federacio proponi la utiligon de E-o en la Eŭropa Komisiono. Unu el ili, Emerenzio Barbieri, dum la nuna parlamenta mandato prezentis leĝproponon pri nia lingvo.

Ĉu ankoraŭ mencii, ke la hejmpaĝoj de la landaj asocioj en la anonclandoj estis pli vizitataj sekve de la reklamoj? Aŭ ke pliaj lernantoj aperis en la kursoj? La slovaka diplomato Josef Reinvart sendis kopiojn de la aperaĵo en SME en 2004 al ĉiuj slovakaj ambasadejoj tra la mondo kaj oficistoj de la ministerio pri eksterlandaj aferoj.

Ĉu reklami estas vana elspezo? Certe ne, sed investo en la estonteco, ĉar se EU agnoskos Esperanton, la mondo tuj sekvos.

Esperanto estas varo same kiel *Coca-Cola, McDonald's*, ktp. Se ni ripete montras la solvon al la nuna lingva malegaleco, ni havos la ŝancon sukcesi, ekzemple per samtaga reklamado dum unu jaro ĉiumonate en la 27 EU-landoj. Nun oni simple cedas antaŭ la ĝeneraliĝo de la angla. Nia misio estas veki la homaron de tiom vasta soporo, imitante Ludovikon. Mi pensas, ke tia sen precedenca agado povus utili kiel brulŝnuro.



Ni perdos ĉion. Certe io sekvos. Ni bezonas investi por sukcesi. Ĉiu organizo kaj kompanio progresas aŭ regresas. Ne ekzistas horizontala flugo.

Ĉi kampanjo okazu kadre de pli vasta strategio, kio inkluzivu ekzemple, ke LA konigu la reklamojn al iliaj landaj kaj EU-parlamentanoj, varbado de kursanoj aŭ aliaj agadoj laŭ la landaj kondiĉoj. Ankaŭ tio altiros la amaskomunikilojn kaj Esperantujo vigliĝos.

Mia unua reklamo kostis pli ol EUR 70.000 kaj la prezo trioniĝis kondiĉe al 10-foja ripeto. La nuna UEA-havaĵo larĝe sufiĉas por tio. Kion la Esperantistaro opinias? Mi dankas al Seán Ó Riain, Renato Corsetti, la estroj de Landaj Asocioj kaj tradukistoj pro la valora kaj sindona apogo dum nia febra kontaktado.

Majstro Hidemaru Deguĉi, kiu sugestis en 1923 adopti Esperanton al Majstro Onisaburo Deguĉi, diris: Homoj ĝenerale alkroĉitaj al la nuno, forgesas la pasintecon kaj ignoras la estontecon. Ni, do, kuraĝe agadu por ke 'la nepoj nin benu'.

Etsuo MIYOSHI

MIYOSHI Etsuo (□□ □□) *[mijoŝi ecuo] (naskiĝis la 16-an de decembro 1939) estas japana Esperantisto.*
Li estas Honora Prezidanto de Korporacio Swany, kiu produktas gantojn, valizojn kaj ekde 2012 ankaŭ rulseĝojn.
En 1996 li kreis la bastonvalizon Walkin'Bag kaj pro la kreo de nova entrepreno ligita al ĝia surmerkatigo, la registaro premiis lin. Li eklernis Esperanton en 1995 kaj tuj post tio li decidis finance subteni la Esperanto-Movadon per la kreo de Subvencio Cigno. Ekde 2012 la premio estas transformita al Fondaĵo Cigno, kies celo estas premii la informan agadon pri Esperanto farita ene de la Eŭropa Unio.Li estas prezidanto de Higashikagaŭa Esperanto-Asocio ekde ĝia fondiĝo.
Inter 2002 kaj 2010 li aperigis 23-foje tutpaĝajn anoncojn en diversaj ĵurnaloj de la Eŭropa Unio, ĉefe en la franca Le Monde. Pro tia agado, en 2007 li estis honorita de Japana Esperanto-Instituto per la atribuo de Premio Osaka. De 2007 li estas Honora Membro de Eŭropa Esperanto-Unio. Estante aktiva en Oomoto, li estas unu el la Direktoroj de Esperanto Populariga Asocio (EPA). En 2001 li fariĝis Direktoro de la Monda Federalista Movado (Mondfederistoj). En 2011 pro lia laboro por Esperanto kaj la diskonigo de la pola kulturo estis al li transdonita la Kavalira Kruco de la Ordeno de Merito de la Pola Respubliko. Ekde 2009 Etsuo Miyoshi prezidas la Novan Turisman Asocion de Higashikagaŭa kaj ene de ĝi lanĉis la tre sukcesajn Pupekspoziciojn okazantaj en oktobro ĉiujare, kiam pupoj de diversaj regionoj de la mondo portantaj tradiciaj vestaĵoj estas montrataj. Li nun vicprezidas la Asocion de Infana Kabuko.

Legio Bona Volo

Konsideroj en Esperanto

Legio de Bona Volo, LBV, estas brazila institucio civila, spiritualista, filantropia kaj eduka. Ĝia oficiala celo estas "prepari la vojojn por la Triumfa Reveno de Jesuo", en praktiko, ĝi faras karitatan laboron per infanejoj, restejoj por maljunuloj, disdono de helpo al malriĉuloj, ktp.

La origino de LBV venas de la radioelsendo *Horo de Bona Volo*, kiun la fondinto de la organizo Alziro Zarur (1914-1979) kreis en la 4-a de marto 1949 ĉe Rádio Globo, en urbo Rio-de-Ĵanejro. La asocio estis oficiale fondita en la 1-a de januaro 1950.

LBV starigis lernejojn kaj Komunecajn Edukajn Centrojn kiuj oferas tra la tuta lando porinfanan edukadon, fundamentan, mezan kaj suplementan instruadon kaj profesiigajn kursojn al miloj da infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj de malriĉaj komunumoj.

Jose de Paiva Netto *(*1)* kreis la Insignon Ordeno de la Merito de Ekumena Frateco, premio kiu ekde 1996 estas ĉiujare donata ĉe ParlaMundi de LBV al tiuj, kiuj plej multe distingiĝas sur siaj agokampoj havantaj kiel baza principo la senliman solidarecon en siaj aktivecoj.

Sekvas artikoloj aperintaj en centoj da gazetoj, revuoj kaj ttt-ejoj en Brazilo kaj en la mondo.
http://www.paivanetto.com.br/index.php/esp/artigos?cs=100



Aidoso – Viruso de antaŭjuĝo damaĝas pli ol la malsano mem

La homa organismo estas la plej eksterordinara maŝino en la mondo. Eĉ tiel, ĝi foje paneas. Tamen, kun Amo, eĉ kuraciloj prezentas pli bonan rezulton. Niaj gefratoj, kiuj suferas pro la viruso HIV, kaj tiuj, kiuj suferas de aliaj malsanoj, ĉu korpaj, ĉu mensaj, ĉu spiritaj, bezonas unue Fratan Amon, kune kun medicina ĝusta helpo. Se homo sentas, ke li estas humane apogata, tiam li kreas iaspecan tre fortan internan reziston, kiu helpas lin resaniĝi aŭ pacience elteni doloron. Mi kutimas aserti, ke viruso de antaŭjuĝo damaĝas pli ol la malsano mem.

Al tiuj, kiuj suferas forlason fare de malnovaj kolegoj, fare de amikoj de intelekteca diskutado kaj eĉ fare de plej karaj familianoj, jen mi prezentas la konsolon de ĉi tiuj vortoj de Dom Paulo Evaristo Arns, Emerita Kardinalo-Ĉefepiskopo de San-Paŭlo, Brazilo, en lia kortuŝa verko *De Espero al Utopio — Atesto pri Vivo*: *"Dia graco neniun forgesas kaj ne obeas surbrustan identigilon. Sufiĉas rememori la duan ĉapitron de la libro Genezo, kaj senti, kiel la Dia blovo enŝovas vivon en la homon kaj donas al li kiel kunulon Esperon por la tuta vivo. (...) Fakte, la mondo apartenas al Dio, kaj Dio ĉeestas en la koro de ĉiu homo, eĉ se li ne sentas Lin aŭ ne esprimas tion pri Li laŭte. (...) Utopio estas la kunigo de ĉiaj esperoj por plenumado de komuna revo. Se oni plenumas tiun revon, tiam oni konstruas ian novan realaĵon"*.

For de Frata Amo, aŭ Respekto, se tiel oni emas kromnomi ĝin, la Homo neniam scipovos vivi en Ekumena, Altruisma, Solidara Socio, ĉar lia ekzistado reduktiĝos al terura "universo", nome la malgrandanima "universo" de egoismo. Pro tio, la franca pensulo kaj sociologo Augusto Comte (1798-1857) skribis: *"Vivi por aliaj homoj estas ne nur leĝo de devo, sed ankaŭ de feliĉo"*. Temas pri instruo, kiun iu ajn neniel devas forgesi.

Al la Junularo

(Artikolo publikigita de ĵurnalo O Imparcial, de Monte Alto, San-Paŭlo, Brazilo, prezentita en la Elsendo Bona Volo.)



Toksoj *(*2)*: letero de filo al lia patro.

Tiu ĉi estas adiaŭa letero de 19-jara junulo. La afero estas vera, ĝi okazis en hospitalo en San-Paŭlo, Brazilo.

"Mi opinias ke sur ĉi tiu mondo neniu celis priskribi sian propran tombejon. Mi ne scias kiel mia patro akceptos tiun ĉi raporton, sed mi bezonas ĉiujn fortojn dum restas tempo. Mi bedaŭras, mia patro, mi kredas ke tiu ĉi dialogo estas la lasta kiun mi havas kun vi. Mi ege bedaŭras, vere... Jam estas la tempo por ke vi konu la veron pri kiu vi neniam suspektis. Mi estos konciza, klara kaj celtrafa.

Tokso mortigis min, mi konatiĝis kun mia mortiganto kiam mi estis 15-jara. Terure, ĉu ne, patro? Ĉu vi scias kiel mi konis tiun malfeliĉegon? Pere de viro elegante vestita, vere eleganta kaj bone parolanta, kiu prezentis min al mia mortigonto: tokso. Mi provis rifuzi, vere mi provis, sed la viro tuŝis mian honoron, dirante ke mi ne estas viro. Mi ne bezonas diri plu, ĉu ne, patro? Mi eniris en la mondon de tokso. Komence okazis revado; poste torturoj, mallumo, mi nenion faris sen la ĉeesto de tokso. Poste venis la aermanko, timo, halucinoj, kaj tuj poste la eŭforio de la klimakso denove, mi sentis min pli forta ol aliaj homoj, kaj la tokso, mia neapartigebla amiko, ridetis, ridetis.

Kiam oni komencas, mia patro, oni opinias ĉion ridinda kaj tre amuza, eĉ Dion mi opiniis ridinda. Hodiaŭ, sur hospitala lito, mi rekonas ke Dio estas pli grava ol ĉio en la mondo. Kaj ke sen Lia helpo, mi ne skribus tiun ĉi leteron. Patro, mi estas nur 19-jara, kaj mi scias ke mi ne havas la minimuman ŝancon postvivi. Estas tre malfrue al mi, sed al vi, mia patro, mi faras lastan peton: montru tiun ĉi leteron al ĉiuj junuloj kiujn vi konas. Diru al ili ke ĉe ĉiu pordo de lernejo, de prepara kurso por universitato, ĉie ajn, estas ĉiam viro elegante vestita kaj bone parolanta, kiu montros al ili la mortigonton kaj detruonton de iliaj vivoj, kaj la kondukonton de ili al frenezecon kaj morto, kiel okazis al mi. Bonvolu fari tion, mia patro, antaŭ ol estos tro malfrue por ili. Pardonu al mi, patro... Mi jam tro suferis, pardonu min ankaŭ ke mi faras vin suferi pro miaj frenezaĵoj. Adiaŭ, mia patro".

Iom da tempo post ol skribi tiun ĉi leteron, tiu junulo mortis.

Noto de la redakcio *(de LBV)* - Nia ĵurnalo ricevis kopion de tiu ĉi letero kaj ne publikigis la nomon de ĝia aŭtoro. Jen kial Elsendo Bona Volo frate sugestas: ni bone zorgu pri nia junularo, kiel faras LBV, ĉar al neniu el ni estas interese havi patrujon el drog-konsumantoj, drinkemuloj kaj malsukcesintoj. Ni volas ja generacion, civilizacion el viroj kaj virinoj, junuloj kaj infanoj honestaj, realigantaj en la Bono, amantaj Pacon, Justecon kaj Veron. Por tio Legio de Bona Volo senĉese laboras. "Junulo estas la estonteco. Sed ne malproksima estonteco, li estas la estonteco en la estanteco: ni fidu al li". La miraklo kiun Dio atendas el la homoj estas ke ili lernu ami unu alian.

*(*1) José de Paiva Netto, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis la 2-an de marto 1941, en Rio-de-Ĵanejro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵanejro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).*

*(*2) Tokso/Venena: (tóxicos)*

Ameriko

Jara raporto 2011

En la jaro la Amerika Komisiono de UEA havis kelkajn malfacilaĵojn por interkomunikado kaj pro la manko de reprezentantoj el la nordamerika regiono. Inter la pozitivaj raportindaĵoj estas la okazigo de la 8-a Tutamerika Kongreso en San Paŭlo kune kun la 46-a Kongreso de Brazila E-Ligo kaj la Junulara Kongreso de BEJO; ili estis bona kadro por realigo de E-kinofestivalo. La festivalo kaj la 8-a TAKE ricevis financan subtenon per la subvencio Cigno. Sendube tiuj ĉi eventoj kune markis pintan momenton por la amerika movado kaj ĝin partoprenis nome de la komisiono la kunordiganto Alberto Fernández-Calienes (Kubo) kaj James Rezende Piton (Brazilo). La kongreso evidentigis, interalie, la bezonon plifortigi la monvarbadon per la fondaĵo Ameriko cele al financa subteno de la kongresoj kaj aliaj regionaj projektoj.

Cetere, la brazila movado ankaŭ multe aktivis en la informa kaj instrua agadoj per eldonado de sia organo *Brazila Esperantisto*, la retejo, lokaj renkontiĝoj, novjara aranĝo en Paranapiakabo kaj starigo de kampanjo favore al Vinilkosmo, i.a.

Flanke de Kolombio resume menciindas la partopreno de la prezidanto Luis Jorge Santos-Morales ĉe la Brazila kaj Tutamerika Kongreso kiel unu el la ĉefaj prelegantoj kaj lia eniro en la Panteono de *Edukado.com.* Ankaŭ menciindas kiel grava okazintaĵo la revigliĝo de la movado en Cali kaj la elektiĝo de Rubén Torres kiel nova prezidanto dum la 17-a Kolombia Kongreso de Esperanto okazinta en decembro. Substrekindaj rezultoj de tiu kongreso estis ankaŭ la nomumo de nova estraro de KEL (Kolombia Esperanto-Ligo) kaj la revivigo de ties organo *Andaj Ondoj*.

Dume, en Kubo la landa asocio daŭre flegis la rilatojn kun la kuba nacia UNESKO-komisiono kaj la plano ekinstrui Esperanton en ĝia lerneja reto progresis; la asocio partoprenis per bunta stando en la Internacia Librofoiro de Havano.

En Usono okazis la tradicia NASK inter la 2-a kaj la 10-a de julio ĉe la Universitato de Kalifornio (San Diego) kaj la landa kongreso okazis junie en Emeryville (Kalifornio).

Kanada E-Asocio daŭre funkciigis sian grandan libroservon unu el la plej grandaj perpoŝtaj libroservoj en Ameriko, specialiĝanta pri libroj verkitaj en kaj pri Esperanto kaj regule publikigis sian orga-non *Lumo* kiu aperas dufoje jare; krome en Kanado okazis la 18-a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto en Novjorko (ARE) kiun oganizas Esperanto-Societo Kebekia (ESK).

En Meksiko la movado restis vigla kaj okazigis sian nacian kongreson kaj pluraj kursoj ĉe UNAM, i.a; menciindas ke la juna belgino



Esperantistoj en Meksikio

Anneleen Nys daŭrigis sian itineron tra diversaj amerikaj landoj kiel parto de projekto *Esperanto al Ameriko* iniciatita de Martin Schaeffer kaj la komisiono en 2010. (Ekvadoro, Nikaragvo kaj Peruo).

En Dominika Respubliko okazis signifaj paŝoj por revigligo de la movado kiu planas okazigi la venontan TAKE en 2013.

Inter la malfortoj estas la retejo *Ameriko.org* kiu ne bone funkciis dum la jaro kaj oni daŭre serĉas taŭgulon preta entrepreni la taskon. Same aliaj projektoj pendantas pro la manko de homfortoj kaj financaj rimedoj en la regiono, kio reprezentas grandan defion por la komisiono.

Alberto F. Calienes, UEA-Amerika Komisiono

Omaĝo al Tibor Sekelj

Tibor SEKELJ (foje nomita ***Székely Tibor*** laŭ la hungara skribmaniero, naskiĝis la 14-an de februaro 1912 en Spišská Sobota en Aŭstrio-Hungario; mortis la 20-an de septembro 1988 en Subotica, Vojvodino, Jugoslavio) estis hurgardevena jugoslava mondcivitano ĵurnalisto, esploristo, verkisto kaj juristo. Li entreprenis ekspediciojn tra Sudameriko, Azio kaj Afriko. Diference de aliaj mondvojaĝantoj kaj esploristoj lia esplorcelo esence ne estis la materiaj aspektoj de la mondo, sed li volis kompreni kaj malkovri la esencon de la homa animo. Kampoj sur kiuj li agis ege sukcese estas multegaj.

Apud la lingvoj hungara kaj serbo-kroata li interalie parolis ankaŭ la germanan, hispanan, anglan, francan kaj Esperanton. Sekelj estis lerninta ĉirkaŭ 25 lingvojn kaj foje diris ke li konservis kapablon por 9 inter ili.

En 1986 li estis elektita membro de Akademio de Esperanto kaj honora membro de UEA. En 2011 Eŭropa Esperanto-Unio proklamis la jaron 2012 «La Jaro de Tibor Sekelj» pro la 100-jariĝo de lia naskiĝo.

Sudameriko 1939-1954

En 1944, sen granda antaŭa montgrimpa sperto, li partoprenis ekspedicion al Akonkagvo la plej alta monto (6□962m) de Ameriko, gviditan de la konata svisgermana montgrimpanto Georg Link. Kun la aŭstro Zechner kaj la italo Bertone li atingis la montsupron je la 13-a de februaro 1944. La ekspedicio estis drama: kvar el ses junuloj kiuj partoprenis pereis en neĝŝtormo. Iliajn korpojn retrovis 11 monatojn poste dua ekspedicio, kiun Tibor ankaŭ partoprenis, laŭ iniciato de la argentina armeo. Post tiu dua ekspedicio Sekelj aldonis novan ĉapitron al la dua eldono de la jam aperinta "*Tempestad sobre el Aconcagua", 1944* en kiu li rakontas tiun aventuron.

1972-1988: Direktoro de muzeo en Subotica

Laŭ invito, en 1972, li iĝis direktoro de Urba Muzeo en Subotica (Serbio – Vojvodino) kaj profesie gvidis la muzeon dum 4 jaroj. Jam en la malfrua vivaĝo en la 1970-aj jaroj li postdiplome studis muzeologion en Zagreba Universitato kaj doktoriĝis pri tio (en 1976) sed preskaŭ tuj poste forlasis sian postenon, ne havinte subtenon por siaj ideoj kaj projektoj.

Li partoprenis en monda kongreso de etnografoj en Ĉikago en Usono kaj en Monda kongreso de muzeologoj en Kopenhago, kie li estis elektita sekretario de Internacia Komitato de Muzeologoj, kie li faris aron da iniciatoj interalie pri novtipaj muzeoj kun dioramoj.

En 1985 Tibor konatiĝis kun Erzsébet Sekelj, bibliotekistino, naskita en 1958. Ŝi esperantiĝis en tiu sama jaro. Tibor kaj Erzsébet kunvivis tri jarojn kaj geedziĝis en 1987 en Osijek. Ili kune vizitis tri UK-ojn. Erzsébet partoprenis en redaktado de la vojvodina revuo VELO. Ili komune deziris kompili Esperanto-Serbokroatan vortaron, sed tion jam ili ne sukcesis fini.

Ekde 1972 li vivis en Subotica ĝis sia morto la 20-an de septembro 1988. Li estis entombigita la 23-an de septembro en *Bajsko groblje* (Baja tombejo) en Subotica, kun la plej altaj honoroj flanke de urbo Subotica. Sur lia tombo, sub bronza bareliefo legeblas jena surskribaĵo en Esperanto:

TIBOR SEKELJ
1912-1988
Verkisto, mondvojaĝanto

Eta biografio laŭ Vikipedio

La Omaĝo

De la 18ª/20ª de majo 2012, en Subotica, Serbio, oni omaĝis la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de Tibor Sekelj. Krom la Ronda Tablo *Vivo kaj verko de Tibor Sekelj,* en la programo de la manifestaĵo estis ankaŭ literatura vespero dediĉita al la verkoj de Tibor Sekelj, du ekspozicioj – *Centjaro de Tibor Sekelj,* kies aŭtoro estas Mile Tasić el Subotica kaj *Pupoj*[2], kies aŭtoro estas Ivan Špoljarec el Zagreb – inaŭguro de memortabulo sur domo kie loĝis Tibor Sekelj, eldono de libro dediĉita al Tibor Sekelj (kaj lia etnografia kolekto), ktp. Krom tio, okazis kelkaj aliaj programoj, kiujn preparis kulturaj institucioj en Subotica.

Rilate la kernon de la manifestaĵo, la *Rondan Tablon,* al ĝi sian partoprenon anoncis 28 personoj, kun 30 prelegoj, el dek landoj. La prelegojn oni dividis inter la sesioj, zorgante ke ĉiuj kvar sesioj havis laŭteme ju pli eble koheran grupon.

Ĉiuj programoj de la manifestaĵo estis publikaj. Krom tio gravas, kaj ni tion substrekas, la malfermon de la manifestaĵo, kaj la kvar sesiojn de la *Ronda Tablo* oni povis pere de interreto spekti en la tuta mondo (en esperanto), uzante la eblecon de tielnomata (angle) *video streaming,* pere de adreso www.subotica.rs. Ekde la 15-a de majo je tiu retejo oni trovis ankaŭ la skajpan adreson pere de kiu oni povis aktive partopreni la diskuton dum la sesioj de la *Ronda Tablo.*

Georgius Dragojlovic

A N O N C O J

Nia celo

La ĉefaj celoj de SEK-Bulteno estas: **Unue** informi pri Esperanto en nia regiono kaj en la mondo al ne-esperantista publiko. **Due** infomi pri kelkaj E-aktivaĵoj al esperantistoj. Tio estas la kialo de la plimulta hispan-lingva materialo eldonita.

Atenton!

Se vi ŝanĝis vian poŝtan adreson aŭ ret-adreson bv sciigi al nia Redakcio. Antaŭdankon.

Ĝustiĝo

En antaŭa SEK-Bulteno n-ro 34, aperis kelkaj nevolaj tajp-eraroj:
Sur paĝo 9 devas diri "…en abril UEA deberá **decidir**…"
Sur malantaŭa paĝkovrilo devas diri "…forpasis la 10-an de decembro **2011** en…"

Dankon pro via kompreno.

Klarigo

Pri la subskribitaj artikoloj respondecas iliaj aŭtoroj kaj ili ne nepre reflektas la opinion de SEK aŭ de la redaktoro.

Poŝtmarko pri la 125-jariĝo de Esperanto



Por omaĝi la 125-an datrevenon de la apero de la Unua Libro de Esperanto kaj por reklami la lingvon, UEA mendis ĉe la nederlanda kompanio PostNL poŝtmarkon kun la jubilea emblemo desegnita de la brita esperantisto Peter Oliver. Ĝi validas por afranki unuaklasa leteron ĝis 20gr. enlande en Nederlando. En marto la simbolo aperis sur poŝtmarko mendita de Esperanto-Asocio de Finnlando. La nova nederlanda marko estis eldonita sojle de la Malferma Tago de la Centra Oficejo (28 aprilo), sed ĝi estas jam aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA, en blokoj de 10 markoj. Unu bloko kostas EUR 6,00 (plus afranko; kvanta rabato ne estas aplikebla).

La poŝtmarko pri la 125-jariĝo de Esperanto estas la kvina laŭ mendo de UEA.

Gazetaraj Komunikoj de UEA n-ro 450